WHEREAS, the President of EANA, the Central Administrative Committee of the Association, and several members whose advice has been sought, have recommended action based on the evident conclusion that under present circumstances EANA can no longer cooperate with UEA,

BE IT NOW AND IT IS HEREBY RESOLVED BY THE BOARD OF DIRECTORS OF THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA that the Esperanto Association of North America dissolves its affiliation with the Universal Esperanto Association as of August 20, 1956, date of the letter informing the General Secretary of EANA of his expulsion from UEA, and that such severance of relations with UEA shall remain effective as long as present circumstances prevail, and be it further

RESOLVED, that the Esperanto Association of North America condemns the action of UEA as unjust, not based on proper evaluation of all the facts, and contrary to the interests of Esperanto in North America and in the world, and be it further

RESOLVED, that the General Secretary of EANA, with the consultative assistance of the Central Administrative Committee, be authorized to bring whatever action he deems necessary against the official UEA publication "Esperanto" because of an untrue and libelous letter published against him in its May 1956 issue, and be it further

RESOLVED, that the Esperanto Association of North America stands ready to cooperate with neutral Esperanto organizations in other countries, which are free from ulterior motives in promoting particular ambitions or ideologies, in any manner that may effectively contribute to the promotion and application of Esperanto in accord with its best traditions, and be it further

RESOLVED, that the Esperanto Association is at one with its loyal members, who have often expressed and shown confidence in their national organization EANA, and have so devotedly and unselfishly labored in its ranks to increase the influence and reputation of Esperanto in our country, and are conscious of the importance of this decision, and with serenity of spirit demonstrate solid unity in the struggle for the ideals of liberty and sovereignty, free from any dictatorial control from any and all non-neutral sources including the UEA, and be it finally

RESOLVED, that these resolutions be communicated to the Universal Esperanto Association and to Esperanto organizations and interested individuals throughout the world.

BOARD OF DIRECTORS AND CENTRAL ADMINISTRATIVE COMMITTEE

Professor John M. Brewer, President of EANA

Doris T. Connor

J. Henry Kruse, Jr.

Adeline Vigelis

G. Alan Connor

Eulalia Marks

Donald F. Walton

Constance Davis

Myron R. Mychajliw

Elsie Yungbans

The Esperanto Association of North America

KONKURSO PRI NOVAJ MEMBROJ

LA amika konkurado pri varbo de novaj membroj por EANA donas pluajn bonajn rezultojn. Depost majo ĉi-jare la jenaj niaj membroj varbis novajn: *H. Kruse* (8); *R. Powell* (3); *J. J. Hutchens* (1); *N. Winch* (1); *G. W. Bailey, Jr.* (1); *J. Hughmanic* (1); *D-ro W. Solzbacher* (7); *I. Smith* (1); *V. Whanger* (3); *A. Nixon* (1); *H. Tobusch* (1); *R. Kraszewski* (1).

La kvin unuaj, kiuj ĉi-jare varbis ĝis nun plej multe da novaj membroj por EANA estas: *J. Henry Kruse, Jr.* (16); *Robert W. Powell* (12); *Graham E. Fuller* (7); *D-ro William Solzbacher* (7); *Donald F. Walton* (5).

Pri la granda parto de novaj membroj ni ne povis konstati ĝuste pro kies propaganda laboro ili varbiĝis. Sed ĉiuokaze, ĉu tio estis pro artikolo en gazeto, ĉu pro Esperanta literaturo en iu biblioteko, ĉu pro iu propagandilo metita en publika loko, ĝi tamen estis rezulto de "konstanta semado" de niaj membroj. Ni bezonas kiel eble plej multe da semistoj, kaj denove apelacias al nia membraro: faru iom ajn eĉ plej malmulte por propagandi Esperanton, sed faru ĝin.

Membro-Patronoj de EANA. Koran dankon al la jenaj personoj, kiuj lastatempe renovigis siajn membrecojn en la alta kategorio de Patrono: *Angela Alfaroli, Eugene M. Beck, J. Leo Chapman, J. F. Clewe, H. E. Dillinger, Serĝento James C. Faughnan, John P. A. Greenwood, Andrew O'Reilly, Orlie Pell, Russell H. Rausch, Nina W. Rivers, Herbert W. Smart, Pastro Robert Sparks.*

Ekstraj kontribuoj al la Subtena Kaso estas ricevitaj lastatempe de la sekvantaj membroj: *Peter Tan* \$1, *D-rino L. A. DeVilbiss* \$5, *Carle Brawner* \$1, *J. A. Lazdins* \$2.

Esperanto Pronunciation and Practice Record still available from EANA. Interesting, instructive, entertaining. A model for pronunciation of the Esperanto alphabet and a practical example of the clarity and beauty of Esperanto. An eight-page mimeographed "Guide" gives the text of the disk and suggestions for utilizing the material in a novel game. 10-inch disk, made of non-breakable Vinylite, two sides, 78 RPM. Regular price \$1.50. New members of EANA, or others who have not yet received the disk, may purchase it for the low price of only \$1.00. Members who may wish to send extra copies to friends, etc., receive 10% discount on the regular price.

Original Hand-made Christmas Cards with verses in Esperanto are a specialty of *Cecile Pollatz* and *Jon Willarson* of the Milwaukee Esperanto Club. One dozen assorted cards, including envelopes, sent postpaid for \$2.00. Cecile also makes novel green star earrings and brooches of rhinestones, which are ideal Christmas gifts. Send inquiries an both the above to: *Jon Willarson, 5788 Milwaukee River Pkway, Milwaukee 9, Wisconsin.*

RICHARD HENRY GEOGHEGAN – ESPERANTO-PIONIRO

William Solzbacher

RICHARD HENRY GEOGHEGAN, unua Prezidanto de la Amerika Esperanto-Asocio (kiu poste fariĝis la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko), verkinto de la unua Esperanto-lernolibro por angleparolantoj kaj, laŭ lia propra diro, unua Esperanto-verkisto post D-ro Zamenhof mem, naskiĝis en Dublin, Irlando, la 8-an de Januaro 1866. Ni do povis celebri la 90-an datrevenon de lia naskiĝo. Post la Ora Jubileo de EANA en la pasinta jaro, kaj iomete post la 50-a naskiĝtago de nia *Amerika Esperantisto*, la memoro de tiu geniulo kaj pioniro meritas nian atenton.

La faktoj pri la vivo kaj laboro de Geoghegan estas ne nur interesaj, sed mirigaj kaj inspiraj. Ni esperu, ke iam bona verkisto publikigos kompletan biografion pri li. Geoghegan mortis en Fairbanks, Alasko, en Oktobro 1943, kaj la nombro de tiuj, kiuj konis lin persone aŭ korespondis kun li, rapide malpligrandiĝas. Kelkaj faktoj pri lia vivo, ekzemple pri lia laboro en Ĉinujo kaj Japanujo, ne estas tute klaraj, ĉar diversaj informfontoj kontraŭdiras unu la alian. Mi esperas, ke ĉi tiu modesta kaj nekompleta artikolo eble instigos kelkajn kompetentulojn al publikigo de tio, kion ili scias. Mi ne dubas, ke preskaŭ ĉio pri Geoghegan interresos multajn Esperantistojn.

En Esperanto la plej konataj informfontoj pri Geoghegan estas la artikolo pri li en la *Enciklopedio de Esperanto* (paĝo 183 de la unua volumo) kaj la libro de John Merchant, iama Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, pri *Joseph Rhodes kaj la Fruaj Tagoj de Esperanto en Anglujo* (paĝoj 22-24). Du leteretoj de D-ro Zamenhof al Geoghegan aperis en la *Originala Verkaro* (paĝoj 488-489) kaj du longaj leteroj de Pastro A. Dombrovski al li en *Malgrandaj Pensoj pri Grandaj Demandoj* (paĝoj 157-180). En ĉi tiu artikolo mi tamen utiligas ĉefe fonton ĝis nun laŭ mia scio tute ne uzitan en Esperanto: la *Enkondukon* de Fredericka I. Martin en la libro de Richard H. Geoghegan pri la aleuta lingvo. Geoghegan verkis tiun libron sur la bazo de malnova ruslingva libro de Pastro Ivan Veniaminov – kiu poste fariĝis Lia Metropolita Moŝto Inokenti, Ĉefepiskopo de Moskvo kaj Kolomna en la Rusa Ortodoksa Eklezio. Pri tiu libro de Veniaminov, publikigita en 1834, kiam Alasko estis rusa kolonio, Geoghegan laboris dum multaj jaroj, komparante ĝian enhavon kun la aleuta lingvo, kiel li observis ĝin en siaj vojaĝoj, kaj transskribante la cirilajn literojn en latinajn literojn sur la bazo de alfabeto ellaborita de li mem. La libro ankoraŭ ne estis prespreta, kiam Geoghegan mortis, kaj lia lernantino kaj kunlaborantino Fredericka I. Martin prenis sur sin la finredaktadon. La Usona Registaro (Departemento de Internaj Aferoj) publikigis la verkon en 1944 sub la aŭspico de la Oficejo pri Indianaj Aferoj (*Office of Indian Affairs*), la Alaska Fervojo (*Alaska Railroad*), kaj la Ĝenerala Teradministra Oficejo (*General Land Office*). La plena titolo de la verko estas *The Aleut Language – The Elements of Aleut Grammar with a Dictionary in Two Parts Containing Basic Vocabularies of Aleut and English – By Richard Henry Geoghegan – Edited by Fredericka I. Martin – United States Department of Interior, 1944.*

Leteroj de Geoghegan, el kiuj la Enkonduko enhavas kelkajn eltiraĵojn, montras, ke la problemo de internacia lingvo pasie interesis lin jam

de lia frua juneco kaj ke li studis multajn lingvoprojektojn, inter ili Volapük, antaŭ la apero de Esperanto:

"Jam de miaj knabojaroj la problemo de la kreado de artefarita ilo por tutmonda komunikado altiris mian vivan intereson. Mi sekvis ĝian evoluon de la mezepoko ĝis la nuna tempo kun plej streĉa atento, ne nur teorie, sed per efektiva uzo de diversaj proponitaj lingvoj. Mi korespondis kun la aŭtoroj de la plimulto de la projektoj, kiuj aperis dum la pasintaj 35 jaroj, kaj skribis leterojn en la *Blaia Zimondal* de Merrigi, en la *Lingua kaj Anglo-Franca* de Henderson, en la *Spelin* de Bauer, la *Chabe-Aban* de Maldant kaj eble en dekduo da aliaj, inter ili kompreneble la delonge mortinta *Volapük*.

"Mi konatiĝis kun Esperanto je la fino de la jaro 1887 kaj tuj ekorespondis kun D-ro Zamenhof, ĝia aŭtoro. La rezulto estis, ke li petis min, fari anglalingvan tradukon de lia lernolibro. Tion mi faris, kaj la verketo, presita en 1889, estis la unua publikigaĵo pri Esperanto post la komencaj verkoj de D-ro Zamenhof mem.

"Mia oficiala numero kiel Esperantisto estis 264. Tio signifas, ke mi estis la 264-a aliĝinto al la lingvo. Mi estis la unua angleparolanta persono en la nombro. Mi estis inter la unuaj membroj de la Lingva Komitato, kiu estas kvazaŭ akademio de la lingvo, kvankam pro mia loĝloko je la malproksima Pacifika Marbordo kaj en Alasko mi poste ne plu povis tre aktive partopreni en ĝiaj laboroj. Tamen, je la peto de D-ro Zamenhof, mi tradukis lian *Ekzercaron*, la fundamentan libron pri Esperanto. Poste mi tradukis en anglan lingvon la germanlingvan Esperanto-lernolibron de S-ro Trompeter, kaj mia traduko aperis en du eldonoj, unu presita en Nürnberg (Germanujo), la alia en Uppsala (Svedujo). Mi ankaŭ tradukis en la anglan lingvon diversajn aliajn broŝurojn de D-ro Zamenhof, verkis artikolojn por revuoj kaj gazetoj kaj faris multe da propaganda laboro – sufiĉe malfacila afero tiutempe – en Eŭropo kaj Usono."

En letero menciita en artikolo de Joseph Rhodes (laŭ la libro de John Merchant) S-ro Geoghegan skribis, ke li unue aŭdis pri Esperanto "proksimume en Novembro 1887, kiam mia amiko, S-ro W. J. C. (advokato en Bristol), montris al mi artikolon en *The St. James's Gazette* pri iu 'nova lingvo'. C. tuj skribis latine al D-ro Zamenhof, kiu sendis al ni germanan lernolibron. S-ro C. jam ne trovis intereson en la lingvo, sed ĝi efike absorbis min, kaj per ĝi mi korespondadis kun pli ol 300 personoj..."

Sed ni reiru al la komenco kaj prezentu la faktojn pri la juneco kaj unuaj studoj de Geoghegan laŭ la rakonto de Fredericka I. Martin:

"Richard Henry Geoghegan naskiĝis en Dublin en 1866, la plej aĝa filo de eminenta irlanda kuracisto. Akcidento, kiun li suferis en frua infaneco, kondamnis lin al longaj jaroj de invalideco kaj al daŭra kripleco. Malhavante la normalajn aktivecojn de infanoj, li fariĝis serioza studanto kaj montris mirigan talenton por la lernado de lingvoj. Propriniĉiate li eĉ komencis studi la ĉinan lingvon, kaj tio metis lin en kontakton kun fama brita sinologo (fakulo pri la ĉina lingvo), Profesoro James Legge en Oxford. La rakonto de S-ro Geoghegan mem malkaŝas, kian impreson lia genio faris al du el la plej eminentaj lingvistoj de la mondo. Ĉar ne okazas ofte, ke la dua el la plej altaj aŭtoritatuloj de

grava universitato tion miras pri la klereco de 17-jara junulo, ke li persone fincas lian eniron en la universitaton. Tion faris la Vic-Kanceliero de la Universitato de Oxford, D-ro Jowett, famkonata specialisto pri la grekaj lingvo kaj kulturo.”

Geoghegan mem skribis pri tio: “En 1883, post kelkaj interrilitoj kun Profesoro Legge, ĉi tiu interesigis Vic-Kancelieron Jowett pri mi kaj miaj studoj, kaj la malavareco de D-ro Jowett ebligis al mi iri al Oxford, kie mi sukcesis gajni premion por la studo de la ĉina lingvo kaj iomete poste la universitatan stipendion starigitan honore al Sir John Davis. Mia intenco unue estis eniri la Ĉinan Dogan-Servon, sed poste mi trovis, ke miaj tiucelaj esperoj ne povas efektiviĝi pro infanaĝa akcidento, kiu lasis min iom lama.”

Citinte tion, F-ino Martin rimarkigas: “S-ro Geoghegan modeste ne menciis la fakton, ke li pravigis la konfidon de D-ro Jowett je lia kapableco, gajninte la ĉinan stipendion post nur tri monatoj. Studinte kvin jarojn en Balliol College kaj Jesus College en la Universitato de Oxford, li forlasis la universitaton por instrui klasikajn lingvojn en London. Ŝajnas, ke li havis la impreson, ke la sama korpa difekto, kiu fortenis lin de diplomata posteno, ankaŭ malhelpus lin en universitata kariero. Sed dum sia tuta vivo li daŭrigis siajn sendependajn lingvistikajn studojn. Multaj sciencistoj profitis de lia helpo, sed tro malmultaj el ili publike rekonis lian kunlaboron. Unu el la plej valoraj studoj, kiujn li faris, helpis en la deĉifrado de la Kalendaro de la Maja-Indianoj en Centra Ameriko. Amante la serĉadon de scio pro ĝia propra valoro, S-ro Geoghegan neniam montris amarajn sentojn pri la manko de publika aplaŭdo kaj la sendanka sinteno de tiuj, kiujn li helpis. Lia senlima malavareco neniam elĉerpiĝis.”

Al tiuj vortoj oni povus aldoni el la artikolo jam menciita de Joseph Rhodes (aperinta en *The Esperanto Monthly* de Junio 1917), ke la kriplecon de Geoghegan kaŭzis falo en lia tria jaro, ke en Oxford li ankaŭ studis la irlandan (ersan) lingvon kaj ĝeneralan filologion, ke poste li “iris al siaj fratoj je la Pacifika Bordo, kie li trovis pli profite instrui stenografion ol la klasikajn lingvojn, kaj ke “post ses monatoj (tio ŝajne estas miskompreno) kiel sekretario de japana konsulo, li foriris al Alasko... kiel oficiala raportisto en Registara Juĝejo, kaj lia... foresto en tiu frosta regiono estis malprofito al Esperanto, kvankam ĝi donis al lia nelacigebla menso la okazon, prepari historion kaj gramatikon de la lingvo de la Aleutaj Insulanoj.”

Ni nun prokrastu pluan preparolon pri la laboroj de Geoghegan en Okcidenta Usono kaj Alasko kaj reiru al la unuaj jaroj de Esperanto kaj al la rolo, kiun la genia irlandano ludis en la frua historio de nia lingvo.

La aserto de Geoghegan, ke li estis la unua verkinto de Esperantolernolibro post Zamenhof mem, ŝajnas esti nur relative ĝusta. En la listo de D-ro Zamenhof la angla eldono de la Unua Libro, tradukita kaj adaptita de R. H. Geoghegan, estis “N-ro 5”. N-ro 1 (rusa eldono), N-ro 2 (pola eldono), N-ro 3 (franca eldono), N-ro 4 (germana eldono) estis verkita de Zamenhof mem. Li estis tiel modesta kaj eĉ timema homo, ke estas tute verŝajne, ke li verkis ĉiujn kvar tute sola, sen ies helpo aŭ konsilo. Do, laŭ la oficiala listo de Zamenhof, Geoghegan estis la unua Esperanto-verkisto post la Majstro.

Tamen estas fakto, ke *alia* angla eldono de la Unua Libro de D-ro Esperanto jam estis aperinta en 1888, unu jaron antaŭ la eldono preparita de Geoghegan. Ĝin preparis iu "J. St." en Varsovio, kies scio de la angla lingvo estis tute nesufiĉa kaj fuŝa. Pri tiu eldono temas unu el la leteroj de D-ro Zamenhof al Geoghegan, publikigita en la Originala Verkaro. Tiu letero de la 13-a de Februaro 1888, adresita al S-ro Richard Geoghegan en Birkenhead, diras: "Mi sendas al vi 5 ekzemplerojn de la angla eldono kaj unu de la nova libro. Pro kelkaj kaŭzoj la angla eldono ne povis esti preta ĝis hodiaŭ. Pardonu, ke mi vin tiel longe atendigis, sed ĝi ne estis mia kulpo. Kun estimo – Esperanto." Ŝajnas, ke post ricevo de tiuj ekzempleroj Geoghegan informis D-ro Zamenhof pri la fuŝa angla lingvo de la broŝuro kaj ke Zamenhof kolektis kaj detruis ĉiujn ekzemplerojn de la libro. Li poste neniam menciis ĝin en sia listo, kaj la traduko de Geoghegan prenis ĝian lokon. Kiel la lernolibroj en aliaj lingvoj, la angla eldono estis presita en Varsovio. Ŝajnas, ke la unua Esperanto-lernolibro presita ekster Rusujo estis la verketo de D-ro Henry Phillips, Sekretario de la Amerika Filozofia Societo, *An Attempt Towards an International Language, by Dr. Esperanto, translated by Henry Phillips*. Ĝi aperis en la eldonejo Henry Holt & Co. en New York en 1889, kaj ĝia numero en la listo de D-ro Zamenhof estis 22.

Juĝante laŭ la listo de D-ro Zamenhof, kaj malatentante la fuŝulon J. St., oni povas starigi la jenan liston de la unuaj Esperanto-verkistoj en la ordo, en kiu iliaj verkoj aperis ĝis Oktobro 1889:

1. D-ro L. L. Zamenhof en Rusujo
2. Richard Henry Geoghegan en Britujo, poste en Usono
3. David Gureviĉ en Rusujo
4. Antoni Grabowski en Rusujo
5. Leopold Einstein en Germanujo
6. D-ro Henry Phillips en Usono
7. G. Henriclundquist en Svedujo
8. Auguste Demonget en Francujo
9. Edgar de Wahl en Rusujo
10. Rudolfs Libeks en Rusujo, poste en Brazilo.

En tiuj du jaroj ili kune verkis 29 libretojn – el kiuj D-ro Zamenhof sola verkis 14.

Richard Henry Geoghegan ankaŭ tradukis la *Complete Instruction Book* de D-ro Zamenhof (eldonitan en Nürnberg en 1892 kaj en Uppsala en 1898), la *Grammar and Exercises of the International Language Esperanto* (bazitan sur *Grammaire et Exercices* de L. de Beaufront kaj publikigitan en la eldonejo de *Review of Reviews* en London, en 1904), la *Alvokon al la Gazetaro de la Mondo* de D-ro Zamenhof kaj *A Few Words on the International Language Esperanto* de D-ro Zamenhof (eldonitan en Uppsala, Svedujo, en 1898).

Geoghegan venis al Usono en 1893 kaj iris al Alasko en 1902, restante tie ĝis sia morto en 1943. Ŝajnas, ke de Alasko li revenis al Okcidenta Usono nur tre malofte. La libro pri la aleuta lingvo mencias ekzemple prelegon, kiun li faris en 1909 en la Filologia Societo de la Ŝtato Washington. Li iam estis Sekretario de tiu societo.

La *Enkonduko* de Fredericka I. Martin diras: "Baldaŭ post lia foriro de Oxford li fariĝis lingvistika konsilanto de la Japana Registaro kaj

servis en tiu ofico dum 9 jaroj. Poste, dum du jaroj, li estis brita vic-konsulo en Seattle kaj Tacoma, en la Ŝtato Washington. De tempo al tempo li faris vojaĝojn al la Oriento en la intereso de siaj lingvistikaj studoj. Dum unu el tiuj vojaĝoj li interesiĝis pri la mirigaj novaj trovaĵoj de antikvaj ĉinaj profetaĵoj enskribitaj sur testudŝelojn kaj la ostojn de bestoj, kaj liaj studoj pri hindaj kaj ĉinaj aferoj estis sendube lia ĉefa intereso dum lia tuta vivo."

La *Enciklopedio de Esperanto* diras, ke "li servis en la fako de fremdaj aferoj de la japana registaro de 1893 ĝis 1900, agis kiel brita konsulo en la Ŝtato Washington en 1900 kaj 1901, kaj estis oficiala stenografiisto en Alasko en 1902 kaj poste." Ŝajnas, ke la laboro por la japana registaro ne okupis la tutan tempon de S-ro Geoghegan, kiam li estis en Usono. Neniu el la fontoj, kiujn mi konas, havas tre precizajn informojn pri la tempo, kiun Geoghegan pasigis en la Malproksima Oriento. Mi supozas, ke li loĝis en Usono de 1893, ĉar la libro de A. Dombrovski menciita supre enhavas leterojn adresitajn al li en Usono en tiu jaro.

Kelkfoje faktoj estas malfacile ekzameneblaj, ĉar la datoj en malnovaj Esperanto-libroj ofte estas nefidindaj. Ekzemple – kiel mi menciis en artikolo aperinta en ĉi tiu gazeto en Marto-Aprilo 1954 – la *Esperanta Frazlibro de l'Turisto* eldonita de *Lingvo Internacia* en 1904 enhavas la "adresojn de kelkaj grupoj Esperantistaj" kaj mencias tian grupon en East Sound, Washington, sub la direkto de Richard Henry Geoghegan – kiu tiam jam estis de du jaroj en Alasko!

Laŭ lia propra diro Geoghegan korespondis en Esperanto kun pli ol 300 personoj. Lia unua korespondanto estis D-ro Zamenhof mem, la dua estis la pola poeto Grabowski, la tria Profesoro Edgar de Wahl, kiu poste publikigis la lingvoprojekton *Occidental* aŭ *Interlingue*. Laŭ la *Enciklopedio* inter la korespondantoj de Geoghegan troviĝis ankaŭ Einstein, Meyer, Libeks, Fredbärj, Bogdanov, Costa e Almeida, Cohen-Ganouna, Marignoni, Ostrovski, Kofman, Beaufront, Lemaire, Beauchemin, Phillips, Casal, Popov kaj Lengyel.

(daŭrigota)

THE BIG EANA CONGRESS, NEWARK, N.J., JUNE 28 - JULY 1, 1957

Plan now for the big Esperanto event for 1957 – the 47th Annual Congress of EANA, to take place in Newark, New Jersey, beginning the evening of June 28th and ending the morning of July 1st. Everything points to the biggest and best EANA convention for years. Many members already know something about the sponsoring group, namely the Esperanto Association of New Jersey, because of news and views of this unexcelled body of active Esperantists printed in "AE" from time to time. The Local Congress Committee is headed by Donald Walton, President of the EANJ, and it is already engaged in making it the best Congress ever. It will be held in the brand new YM-YW Building in the center of Newark. "Co-ed" if you like – or is it "Guys and Dolls"! As for accommodations, there will be rooms for men at the YM-YW; and couples, families, women, and more men, will be accommodated in the Hotel close by. Details in coming issues of "AE". The important thing at the moment is to *plan NOW to attend*.

LA ESPERANTO-STUDANTO

La Nova Modo

Edzino: Kara mia, mi ĵus revenis de la urbo.

Edzo: Ho, jes... ĉu vi havis interesan viziton?

Ŝi: Mi ne vizitis iun. Mi iris pri speciala afero. Nu... kara... ĉu vi ne rimarkas ion?

Li: H-m-m? Ho, jes!... Kio okazis al via jupo? Ĝi trenas preskaŭ al viaj maleoloj. Ĉu akcidento en la aŭtobuso? Kia embaraso por vi.

Ŝi: Ĉi tio estas la nova modo. Ĉu mi ne aspektas bele?

Li: Ĉu nova modo, kara? Kun tiaj longaj jupoj? Ho, mia kara, tio estis la modo jam antaŭ 30 jaroj.

Ŝi: Ho, ne... je tiu tempo ne estis tute same. Rigardu, jen bele faldita jupo... je eleganta distanco de la planko.

Li: Ha... kaprico de la virino! Ĉu ankaŭ mi devas reveni al la modo de antaŭ 30 jaroj? Alta kolumo, strikta pantalono? Ne, mi rifuzas. Mi restos ĝuste kiel mi nun estas.

Ŝi: La modo por viroj ankaŭ iom komencas ŝanĝiĝi. Mi vidis brile koloritajn ĉemizojn en la magazeno hodiaŭ.

Li: Nu... mia kara edzineteto... en via nova modo... staru tie momenton kaj atendu. (Li eliras, sed baldaŭ revenas.) Jen, vi vidas, estas fotografajo de vi... en la jaro 1919... kaj ĝi montras vin en kostumo tute same kiel tiu, kiun vi nun surhavas! Kia bela *nova modo*, ĉu ne?

The New Style

Wife: My dear, I just returned from the city.

Husband: Oh, yes... did you have an interesting visit?

She: I didn't visit anyone. I went for something special. Well... dear.. Notice anything?

He: H-m-m? Oh, yes!... What happened to your skirt? It hangs almost to your ankles. An accident in the bus? What embarrassment for you.

She: This is the new style. Don't I look lovely?

He: The new style, dear? With such long skirts? Oh, my dear, that was already the style 30 years ago.

She: Oh, no... it wasn't quite the same then. Look, a beautiful pleated skirt... at an elegant distance from the floor.

He: Ah... the whims of women! Do I also have to return to the style of 30 years ago? High collar, tight pants? No, I refuse. I shall remain exactly as I am now.

She: Styles for men also are beginning to change a bit. I saw brightly colored shirts in the store today.

He: Well... my dear little wife... in your new style... stand there a moment and wait. (He leaves, but soon returns.) Here, you see, is a photo of yourself... in the year 1919... and it shows you in a costume exactly the same as you now have on! What a lovely *new style*, yes?

—Doris T. Connor

ESPERANTA KRONIKO

La Komandanto de la Usona Armea Centro "Aggressor" (speciala taktika grupo de la Usona Armeo) en radio-intervjuo dum Septembro menciis Esperanton kiel oficiala lingvo de la grupo. Oni eĉ komencis la intervjuojn per kelkaj frazoj en Esperanto.

Virgil Whanger, nia tre helpema samideano en Steubenville, Ohio, provas metodon por semi informon pri Esperanto pere de lokaj bibliotekoj. Al kvin diversaj bibliotekoj en sia urbo, li sendigis la libron "Esperanto: The World Interlanguage", la Sanktan Bibliion en Esperanto kaj abonon al "Amerika Esperantisto" por unu jaro. Imitinda ekzemplo!

Al la feliĉaj geedzoj William kaj Georgiana Vathis la 29-an de Julio naskiĝis filo nomata *Peter William*. La juna paro nun loĝas en Zagreb, Jugoslavujo, kie S-ro Vathis laboras en la Usona Konsulejo. Georgiana kaj Vilĉjo unue renkontiĝis en Hong Kong, geedziĝis en Kolombio, Sud-Ameriko, kaj nun la infano naskiĝis en Eŭropo. Vere internacia afero!

Artikoloj pri Esperanto aperis en multaj ĵurnaloj okaze de la 46-a Kongreso de EANA en Detroit. Jen listo: *Detroit Free Press*, *The Detroit News*, *France Amérique*, *La Liberté*, *The Catholic Standard*, *The Catholic Register*, *Denver Register*, *Eugene Register Guard*, *Catholic Action*, *L'Action Catholique*, *Dziennik Polski*. Leteroj al redaktoroj skribitaj de agemaj membroj ankaŭ aperis dum la somero, jen: *Pasadena Star News* (H. E. Dillinger), *Chicago Daily News* (S-ino M. Avery), *Saturday Evening Post* (Jon Willarson), *New York Herald Tribune* (H. Kruse, Jr.).

Nova Esperantista paro. Venis anonco pri la geedziĝo la 18-an de Aŭgusto en Flushing, N. Y., de *Marian T. Topham* kaj *Herbert W. Smart*. Por la nova paro ni esperas multan feliĉon.

Esperanto-Asocio de Nov-Jersio komencis sian aŭtunan sezonon per kunveno la 5-an de Oktobro kaj per serio de kursoj en lernejoj por plenkreskuloj en la ĉirkaŭaĵo de Newark. Oni denove presis kaj disdonis 1000 ekzemplerojn de bela afiŝo, kiu listigas kursojn komenciĝontajn dum Oktobro.

Vizitantoj al la Centra Oficejo lastatempe estis sufiĉe multnombraj kaj el diversaj landoj: *Van Allen Lyman*, kiu loĝis dum multaj jaroj en la Kanalzono Panama kaj en Kostariko; *Georg Janson* el Svedujo; *F-ino Guiomar Aquino* el Ceará, Brazilo; *Enrique Fong* el Kubo; *Bertha Helmer* el Kalifornio, kiu vizitis survoje dum vojaĝo al Norvegujo; *Gesinjoroj Y. Kuzma* el Kanado; kaj *Paul J. Mimplitsch*, *Michael J. Feketie*, *Robert Powell* kaj *Donald R. Broadribb* el diversaj urboj en Usono.

Nia irlanda amiko Lorcán Ó hUiginn el Dublin pasigis pli ol duonan jaron en Norda kaj Suda Ameriko, laborante kiel parlamenta stenografiisto en la kanada parlamento en Ottawa, en la provinca parlamento de Ontario en Toronto, kaj en la Konferenco de la Internacia Civil-Aviada Organizo en Caracas, Venezuelo. Meze de Julio li revojaĝis al Irlando. Dum du vojaĝoj en Usono li vizitis la Centran Oficejon de EANA. En Washington lin gastigis dum kelkaj tagoj la familio de D-ro William Solzbacher.

La "Pilot Club" de Daytona Beach, Florido, publikigis "Directory of Interpreters and Translators", liston kun adresoj de personoj, kiuj estas pretaj libervole kaj senpage helpi en traduko el fremdaj lingvoj. Inter 20 listigitaj lingvoj estas ankaŭ Esperanto, kaj *F-ino Julia May Leach* servas kiel interpretistino.

El Gvatemalo ni ricevis cirkuleron de *S-ino Consuelo de Sánchez-Latour* (adreso: 10a. C.O.Pasaje Coloma 4, Zona 1, Guatemala City, Guatemala), el kiu ni sciigas, ke ŝi kompilas interesan libron en hispana lingvo kaj Esperanto. La enhavo de la libro konsistas el leteroj de diverslandaj Esperantistoj. Tial ŝi petas ĉies helpon jene: skribu al ŝi leteron priskribante iom pri via lando kaj kutimoj, skribu kion vi scias pri Gvatemalo, kaj kia estas via opinio pri Esperanto. Aldonu ankaŭ vian foton. Ĉiu skribinto ricevos senpage ekzempleron de la libro.

S-ano Allan E. Fineberg, plej juna Esperantisto en Nov-Jersio, aranĝis Esperanto-ekspozicion en Publika Biblioteko en Jersey City. En halo de la Biblioteko li kun helpo de sia patrino bele aranĝis montrotablon kun Esperanto-propagandiloj, gazetoj, libroj kaj eksterlandaj leteroj kaj poŝtkartoj.

La Esperanto-Societo de Milwaukee elektis novan estraron por la venonta jaro. *Jon B. Willarson*, unu el la tri fondintoj de la Societo, kaj ĝia aktiva sekretario dum du jaroj, unuanime estis elektita kiel prezidanto. *Howard Tamms*, lojala membro de la komenco, nun estas la vicprezidanto; *Patrick Murphy* estas la sekretario; *Cecile Pollatz* (la perfekta kontrolistino!) restas kiel kasistino; kaj *Kent Nilsson* servos sian duan jaron kiel registranto. Dum la lasta jar-kunveno en Junio, ok membroj en la kurso de *Jarvis E. Bush* ricevis ateston pri Esperanta kapableco. Por la nova sezono la Societo aranĝis en la loka YMCA du E-kursojn; unu por komencantoj kaj unu por progresintoj. En ambaŭ kursoj partoprenas dudek-kelkaj kursanoj.

La Esperanto-Societo de Chicago sub gvido de *Ges-roj Roy E. Holland* el Naperville fariĝis unu el la plej aktivaj de niaj grupoj. La aktiveco de la grupo daŭras dum la tuta jaro, kvankam en somero ne tiel vigla kiel aŭtune kaj vintre. Ĉi-jare oni organizis kune kun la Esperanto-Societo de Milwaukee belan piknikon ĉe la Illinois Beach State Park, kiun partoprenis 25 personoj. *Herman Tobusch* metis en la telefonlibron por sia telefon-numero la noton "Esperanto", kaj tiamaniere ebligis al multaj informpetantoj ricevi tujan informon pri la lingvo. La informpetoj venas pro artikoloj, leteroj al redaktoro kaj malgrandaj novaĵoj pri Esperanto-vivo aperantaj en la lokaj gazetoj, speciale en "Chicago Daily News", kie nia samideanino *S-ino Marian Avery* estas sekretariino de la administranta redaktoro. Meze de Septembro la Societo gastigis *S-ron Hazime Kusumoto*, studenton el Japanujo, kiu venis por studi en Urbana. *Ges-roj Holland* kaj *S-ro M. Oseña* montris al *S-ro Kusumoto* kaj al liaj kvar amikoj la urbon. La Societo komencis la aŭtunan sezonon per aranĝo de kurso en Chicago kaj en Naperville. La kunvenoj de la Societo estas tre interesaj kaj vere internaciaj pro ĉeesto de diversnaciaj Esperantistoj, ĉefe rifuĝintoj el komunistaj landoj, por kiuj Esperanto estas la sola lingvo en kiu ili povas libere interkompreniĝi.



New books in Esperanto are being published constantly. Our book service handles all titles as soon as they appear. Those who are interested in Esperanto literature, and wish to keep abreast of developments in Esperanto, will find much worthwhile reading in the following new books. Those who may find it inconvenient to make immediate payment may arrange for charge accounts or installment payments. Select your new books and send your order now.

- Sinjoro Tadeo**, by Adam Mickiewicz (tr. Antoni Grabowski). This is a new, second, edition of the famous Polish epic poem portraying the life of the early Lithuanian nobility. Masterful translation by one of the best stylists of classic Esperanto. 334 pp, many full-page illustrations, cloth bound, stamped in gold \$ 2.50
- La Senpera Verbigo de Ādjektivoj**, by H. A. de Hoog. An analysis and critique of certain aspects of Esperanto usage, with examples of much too generally accepted errors. 32 pp brochure25
- Tri Verkoj de Volter (Voltaire)**, tr. E. Lanti. 'Kandid aŭ la Optimismo', 'Zadig aŭ la Destino', & 'Senartifikulo'. Philosophical ideas in easy story form and in simple style. Interesting material on the thoughts of 18th Century 'enlightenment'. 312 pp 2.50
- La Malprudenta Scivolulo**, by Cervantes (tr. Hernandez). From the famous masterpiece "Don Quixote". Amusing and satirical story with profound philosophical overtones. About a husband, who in order to convince himself of his wife's fidelity, persuades his best friend to try and seduce her. 68 pp, ill, art paper covers85
- El La Maniko**, by Reto Rossetti (original). A collection of vignettes and short stories presenting light character studies, episodes in the life of young artists, comments on Esperanto, and even a detective story. All written in lively conversational style with an abundance of dialogue. 221 pp, illust, paper covers 2.15
- Sveda Poemaro**, tr. by Magda Carlson. Seventy-four especially selected poems of thirty-one Swedish poets, both classic and modern. Many of the poems concern themes of religious inspiration; others are lyrical tales. 112 pp, blue flexible art card 1.50
- Kontralte**, by Marjorie Boulton (original). Interesting modern poetry, various themes from a feminine viewpoint. The poems are sentimental, humorous, romantic, erotic, and inspirational. "Stafeto" book, 286 pp, with portrait of author, paper covers 2.15
- Koko Krias Jam**, by Ferenc Szilágyi (original). 13 Esperanto stories touching on incidents in real life, with philosophical comments, humorous anecdotes and historical sketches. Fluent simple style. 225 pp, 2-color illustrated paper covers 2.15

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.



DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Aŭstrujo.** F-ino Lotte Babicka, Gymnasium 16a Distrikt, Abelegasse 29, *Wien*. 17-jara, dez. kor. kun samaĝaj gesamideanoj.
- Brazilo.** Joaquim A. de Figueiredo, Rua Paraná 485, Caixa Postal 38, *Votuporanga* S. P., dez. kor. kaj interŝ. PM kun Usonanoj.
- Ĉeĥoslovakujo.** Stanislav Werner, *Jechonin* 175. 23-jara dez. kor. kaj interŝ. PK, PM, il. filmrevuojn, fotojn de knabinoj 16-18-jaraj. Respondo garantiata.
- Francujo.** A. J. Bayard, 8 rue du Marais, *Noyelles Sous Lens* (Pas de Calais). 36-jara, dez. kor. por interŝ. PK. Helpas al tiuj, kiuj volas perfektigi en franca lingvo.
- Germanujo.** F-ino Rosemarie Bunse, Mühlenstr., (21b) *Niedermarsberg*. 16-jara dez. korespondi.
- Germanujo.** Hieronymus Stroinski, Koloniestr. 10. *Borsdorf b. Leipzig*. Dez. korespondi kun la tuta mondo.
- Germanujo.** Alfred Mayer, Zeppelin-Str. 35, (14a) *Karlsruhe-West*. Dez. kor. kaj interŝ. PM kun ĉiuj landoj.
- Hispanujo.** Salvador Escrihuela, San Jose 35, *Tabernes de Valldigna*, Valencia. Deziras korespondi.
- Japanujo.** Masanobu Ezima, Sanĵo-ryo, 1-19 Sanĵo-dori, Kure, *Hiroŝima*. 22-jara, deziras korespondi.
- Japanujo.** Japan L.P.F.Club, P.O.Box 19, Shinjuku, *Tokyo*. Multaj studentoj dez. kor. Esperante, angle, france kaj germane.
- Japanujo.** Josiyuki Nakahara, 4633-5 Umimachi, *Kasuyagun*, Fukuokaken. 18-jara komencanto dez. kor. kun komencantoj pri diversaj temoj.
- Japanujo.** Tamocu Siozaki, 777 Horiji, *Singŭ-si*, Uakajama-ken. Junulo, deziras korespondi kaj interŝanĝi PM.
- Nederlando.** H. Beverloo, Burg. Gaarl. Str. 35, *Gorinchem* (Z.H.). Dez. korespondi, interŝanĝi PM, PK, gazetojn.
- Nov-Zelando.** Harding Brown, 7 Scarborough Rd., Sumner S.E.3, *Canterbury*. Dez. interŝ. PM kun la tuta mondo.
- Pollando.** Alfons Reinke, *Wicewo*, p. *Bolkowo*, pow. Bialogard, woj. Koszalin. 27-jara oficisto, dez. kor. kaj interŝ. PM, il. PK.
- Pollando.** Stanislaw Walicki, Sienkiewicza 52 m. 32 parter, *Lódź*. Dez. kor. pri grafologio, historio, turismo; Esperante, angle, germane. Interŝanĝas librojn kaj gazetojn.
- Usono.** Alexander Ell, 3030 East Tenth St., *Indianapolis*, Ind. 28-jara, dez. kor. kun la tuta mondo, prefere kun virinoj, kiuj scipovas ankaŭ iomete angle.
- Usono.** Joseph J. Lattanzi, "Schuylkill Co. U.S.A.", *Brockton*, Pa. Dez. korespondi kun samideanoj tra la tuta mondo.
- Usono.** Donald R. Broadribb, Hasting Hall, Room 521, 600 West 122 St., *New York* 27, N.Y. Por helpi pagi kostojn de studado en pastra seminario mi devas vendi ĉirkaŭ 150 el miaj esperanto-libroj. Kiu dezirus aĉeti iujn (je proksimume la duono de la originala prezo), bonvolu peti kompletan liston.

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. When you buy books from the "Esperanto Book Service" all profits are used to give you a better magazine and office. Place all your orders through the "Esperanto Book Service".

PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated.....	\$.25
REED'S PRACTICAL GRAMMAR, Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price.....	.35
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....	Paper \$1.50; Cloth 3.00
COURS PRATIQUE D'ESPERANTO, preface by Th. Carl. Complete text in French with exercises, Partie Élémentaire & Supérieure, 2 vols, 239 pp...	1.45
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....	Cloth 2.00
ESPERANTO (World Language Series), Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc.....	.25
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....	Cloth 6.00
EDINBURGH DICTIONARY. Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....	Cloth .85
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....	Cloth 2.50
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY. Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....	Cloth 2.35
PLENA VORTARO DE ESPERANTO, Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The new latest edition, all-Esperanto dictionary with <i>Suplemento</i> , 511 pp., 4x5½.....	Cloth 3.35
Rare, deluxe printed edition, large format, better paper and binding....	Cloth 6.00
FUNDAMENTA KRESTOMATIO, Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....	Paper 1.85
Latest edition, with additional foot-notes, etc., de luxe printing,.....	Cloth 3.15
KARLO, Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp...	.25
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio). The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....	Cloth 2.50
ESPERANTO SORTIMENTO. Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42 pp; <i>Lando de Arĝenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, & <i>Thais</i> , by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; <i>Roziĵo Ĉiumiljara</i> , the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only.....	1.00
RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS. Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Serba, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection...	2.75
INDIAN BEAD STAR. Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch..	1.00
GREEN STAR PENDANT. Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia...	.75
ENAMEL GREEN STAR. Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch..	.65
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch...	.65
On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch....	.65
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only.....	.65

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight "*Vinylite*" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor.*
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for *only \$36.*

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only \$6 more* for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order *NOW:*

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

A FEW CLARIFICATIONS TO MEMBERS OF OUR ASSOCIATION EANA

Withdrawal from UEA: From President Brewer's letter and the Resolution passed unanimously by the Board of Directors, printed in this issue of AE, you will understand the importance and necessity for withdrawal from UEA; but there are a few points which need clarification. The action taken has to do solely with our affiliation as an organization, and in no way changes any aspect of individual membership in UEA, except that EANA no longer serves as agent to collect dues for UEA. Each individual member of UEA must search his own conscience as to continued membership in UEA, and decide for himself whether to take the risk of possible association with a foreign agency and/or un-American organization (if swiftly moving events were to bring such suspicion upon UEA). Because of that possibility some of our members have discontinued membership in UEA, and others have changed to subscription to the UEA magazine so as to avoid membership. Still others remain as individual members. All this is a matter of individual conscience. The important thing for EANA is that we are no longer affiliated to UEA as an organization, and therefore our members are no longer automatically enlisted as associate members of UEA, which has been the case heretofore. EANA is now an "unaffiliated national association", retaining its rights and sovereignty as an American Esperanto organization, free to cooperate with all Esperanto organizations throughout the world on a voluntary basis (and by the same token our members are free from any and all suspect associations whatsoever.) EANA is now in the same position that the Esperanto movements of Japan, Cuba, Uruguay, Venezuela, Iceland, etc. have been in for many years. Japan has prospered as an unaffiliated national Esperanto association, and EANA can do likewise. We ask our members to unite as never before for Esperanto in America through the representative EANA, established in the year 1905.

An Important New Consideration: Now that all association and unavoidable conflict with UEA has ended, we need no longer use the columns of our official organ "Amerika Esperantisto" for defense and explanation in response to attacks from UEA in their organ and circulars. Let UEA continue their attacks as they see fit, but we now turn to more fruitful activities here in America. Due to necessity for conserving our funds and labors we have had to mirror the difficulties with UEA and its subsidiaries in the pages of "AE". If further clarifications are necessary with respect to conflict in the Esperanto movement, we will use some form of circular apart from "AE", and see that it reaches only those Esperantists who are vitally concerned with the problem and can understand any necessary clarifications. Therefore, after this issue of "AE", we hope to avoid being drawn into any conflict in our official organ. We have reference to UEA and its subsidiaries in this respect, of course. News, book reviews, etc., are another matter; and we shall continue to give you sincere and expert coverage.

The Book Service of EANA: See new price list herewith concerning all books from England. Note that these prices are the lowest anywhere in America — outstanding examples, "Morto de Trajno" \$1.50 (quoted elsewhere at \$2.25); "Vivo de Zamenhof" \$1.00 (elsewhere \$1.25); etc. In addition EANA gives its members 10% credit on orders over \$1.00, to apply to "book dividends" from a special list to be issued by EANA. It is also planned that all profits will go to EANA. It will be worth your while and important to all of us to support the Book Service of EANA.

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, 114 W. 16 St, NEW YORK 11, N.Y.